


# starto

Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio

1971

4



## Prezidanto de VPEA delegito al la XIV-a Kongreso de KPC

**G**ojiga kaj surpriza estis la novaĵo, ke kamarado Nguyen van K i n h, prezidanto de Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, vizitis fine de majo Ĉeĥoslovakion. Li, eminenta reprezentanto de sia lando en internacia medio, venis kiel membro de la nordvjetnama delegacio por partopreni la XIV-an kongreson de Komunista Partio de Ĉeĥoslovakio en Praha. Tial des pli agrable tuŝis nin lia sciigo al k-do Balda, en kiu li esprimis sian deziron renkontiĝi kun delegitaro de la ĉeĥa Esperanto-movado.

Jaudon la 27-an de majo ni kunvenis en la ambasado de VDR. Krom k-do Balda ĉeestis J. Drlik, J. Mařík, ing. F. Sviták, J. Tomčík kaj la subskribinto. Komprenoble plejparto de niaj demandoj koncentriĝis al la laboro de la vjetnamaj pacbatalantoj, speciale esperantistoj.

"Ni havas plenan subtenon de la registaro, kiu dungis du oficistojn por la asocio. Ni nenion devis kotizi", diras k-do Kinh. Ankaŭ libroeldonado tre aktive

## MANPREMO KUN

zi kursojn... Kaj kiamaniere la ĉs. esperantistoj helpu al la justa afero de siaj fratoj en la malproksima lando? La respondo estis konciza: per disvastigo de la vjetnamaj Esperantaj eldonaĵoj kaj informado de la publiko pri la sindefenda batalo de la vjetnama popolo kontraŭ la usona agreso.

Esperantisto de post 1931, s-ano Kinh rememoras pri siaj kontaktoj kun la ĉs. samideanoj. Ili komenciĝis jam post la dua mondmilito, kiam la organo de EAĈSR "Esperantista" (n-ro 10/1950) aperigis lian leteron, kiu estis sekrete portita centojn da kilometroj tra ĝangaloj kaj postenoj de la franca kolonia armeo. La mesaĝo alportis tiam salutojn de vjetnamaj esperantistoj batalantaj kun sia popolo por liberigo, kaj petis pri simila helpo, kiam ni donis al hispanoj, ĉinoj, grekoj kontraŭ fasistoj.

Kiel iama ambasadoro de Vjetnama Demokratia Respubliko en Moskvo k-do Kinh regas krom Esperanto ankaŭ la rusan kaj francan lingvojn.

K-do Nguyen van Kinh promesis al mi intervjuon por la ĵurnalo PRÁCE, kondiĉe, ke oni mencios, ke ĝi okazis en la internacia lingvo. Estis vere agrable plenumi tiun ĉi deziron kaj avantaĝe por nia afero. La intervjuo aperis intertempe la 3-an de junio.

Post naŭdekminuta diskuto oni recipokas sin per donacoj. Ankoraŭ unu manpremo kun ĉiam ridetanta kamarado. Ĉu ni renkontiĝos ankoraŭ? Eble iam, en la liberigita kaj unuigita lando vjetnama.

## HEROA VJETNAMIO

Oldřich K n í ch a l

## Ze života kroužků

**MĚLNÍK** - Přátelským odpolednem uzavřel EK při ZDŠ v Jungmannových sadech letošní studijní ročník mezinárodního jazyka. Za účasti ředitele školy, zástupců ČES a EK Praha předala diplomy absolventům členka Světového svazu esp. mládeže B. Ahlrénová ze Stockholmu. Slavnostní akt se konal 7.6. v Zámecké vinárně.

**OSTRAVA** - K 50. výročí KSČ uspořádal odbor esperanta při DK VŽKG výstavu na téma "Esperantem k světovému míru". Od 7. do 18. června si mohli návštěvníci výstavního kabinetu Společenského domu VŽKG ve Vítkovicích prohlédnout cenné dokumenty o dělnickém esperantském hnutí na Ostravsku.

Na "Večeru sovětské poezie v esperantu", 18. května v Porubě, předvedli účinkující ukázky z původní i přeložené poezie sovětských autorů.

**PRAHA** - Od 1. června se pravidelné úterní schůze konají v nové klubovně : ZK Strojexport, Praha 1, Václavské nám. 56 (v pasáži Blaník). 1.6. zde vyprávěla o hlavním městě Švédska pí A. Ahlrénová, o týden později hostoval v klubu M. Smyčka, člen ústeckého divadla. (Poznámku o tom čtete na jiném místě.)

Podle statistiky za rok 1970 navštívilo klub celkem 3142 osob, z toho 91 zahraničních esperantistů z 22 zemí.

**ŠUMPERK** - Kurs esperanta pro začátečníky úspěšně absolvovalo šest ze sedmi účastníků. Mladí esperantisté pod vedením J. Müllerové prokázali při závěrečných zkouškách dobré znalosti

**TŘINEC** - Počet členů kroužku se zvětšil o dalších sedmáct, kteří koncem dubna ukončili základní kurs pod vedením ing. J. Adamce. Tři z nich se již při-

hlásili za členy ČES. Kroužek se rozhodl zůstat nadále bez právní subjektivity, pod střechou Domu kultury.

Letos již tradičně pořádají třinečtí autobusové zájezdy do zahraničí : v červnu šestnáctidenní do Rumunska, v červenci devítidenní do Polska a v září do NDR. O přenocování a jiné služby mají již postaráno díky péči tamních esperantistů. Vedoucí zájezdů je A. Milatová.

---

František Pytloun 80-jara!

Multaj lernantoj rememoros la 30an de junio la vivjubilcon de sia instruisto, komitatano de EK Poděbrady, honora membro de ĈEA, ekskomitatano de UEA. Lia vivo estas jam de la jaro 1922 firme ligita kun la internacia lingvo Esperanto, kiun li ĝis nun instruas, precipe per siaj skribaj kursoj. En la pasintaj jardekoj li instigis fondiĝon de E-rondetoj en 12 lokoj. Al paĉjo Pytloun ni deziras daŭran sanon kaj bonhumoron ! (cký)

Komunan geedzan vojon ekpaŝis la 30an de aprilo en Mladá Boleslav Marie Najmanová kaj František Roušar, membro de EK Svitavy.

---

1-a NORDBOHEMIA RENKONTIĜO

La 30-an' de majo kunvenis en Teplice ges-anoj el Most, Ústí n. L. kaj Teplice por ĉeesti la 1-an Nordbohemian renkontiĝon. La Asocion reprezentis d-ro V. Novobilský. La ĉeestantoj partoprenis solenan malfermon de la banloka sezono en Teplice kaj la posttagmezon dediĉis al diskuto pri problemoj de la Esperanto-movado en sia regiono. La dua renkontiĝo okazos autune en Ústí nad Labem. (van)

## 70 JAROJ DE ESPERANTISTA KLUBO EN BRNO

Brna esperantistaro rememoris en tiuj ĉi tagoj 70an datrevenon de fondo de la unua klubo sur teritorio de iama Aŭstrio-Hungario, kiu estis konstituita en junio 1901 sub la titolo Aŭstria Esperantista Societo, en Brno en Laborista Domo de la nuntempa Marx-strato. Ĝia fondinto kaj la unua prezidanto estis redaktoro Karel Pelant.

En 1905 la klubo decidis dividi la laboron laŭ la nacioj kaj tiel fondiĝis Klubo de Ĉeĥaj Esperantistoj, kiu komencis tuj bonege prosperi. Post la unua mondmilito ĝi ŝanĝis sian nomon je Esperantista Klubo en Brno. Oni aranĝas plurajn prelegojn, kursojn en diversaj medioj kaj societoj. Reviviĝas ankaŭ la literatura agado. Pozitiva kontribuo al la ĉs. movado estis sukcesa la 1-a ĉs. esperantista kongreso en Brno (1922) kun partopreno de ĉ. 300 personoj. Plua kongreso aranĝita de la klubo estis la VI-a kongreso de ĉs. esperantistoj en 1935.

En la jaro 1928 okazis en Brno Ekspozicio de Nuntempa Kulturo. La klubo atingis eldonon de prospektoj en Esperanto, kiujn ĝi dissendis en la tutan mondon. En la j. 1927 okazis perradia kurso de Esperanto gvidita de J. Bednář kun sukceso neordinara.

La klubo iniciatis perradiajn prelegojn en Esperanto, kies nombro daŭre kreskis. Estis disaŭdigitaj tutaj dramverkoj, operoj, operetoj kaj kabaredoj. La plej granda danko por tiu ĉi eminenta rolo de la brna radio-stacio, nomata Verda Stacio, apartenas al la neforgesebla direktoro s-ano ing. A. Slavík, ekzekutita de nazioj en 1942.

De jaro al jaro grandigis la klubo sian aktivecon en tri direktoj: per kursoj, informado kaj servo por la respubliko. Ĝi partoprenis la prunton Defendo de la ŝtato, rilatis kun pluraj eksterlandaj kluboj, ĉefe kun tiu en Londono, kien ĝi sendis plurajn artikolojn (du el ili aperis kiel ĉefartikoloj en anglaj gazetoj). Pluan agadon malebligis la okupacio: en 1940 sekvis la ordono al likvido de la klubo, kvankam la kunvenoj daŭris ĝis la jaro 1941.

Post la milito la klubo rekomencis sian intensan laboron: kursoj, centoj da pagitaj anoncoj en ĵurnaloj, tutjaraj reklamoj en 11 kinejoj, informado per flugfolioj, pluraj ekspozicioj, prelegoj de elstaraj eksterlandaj esperantistoj ktp. Ĉefe estis akirita solida financa bazo kaj la klubaj programoj farigis spino de la tuta agado.

La klubo meritigis ankaŭ pri la ekspozicio "Cent jaroj de la ĉeĥa vivo" en Kroměříž, plue partoprenis en la ekspozicio "Verko de Petr Bezruč", daŭre kunlaboris kun la Internacia Foiro de Brno, tradukante kelkdekpaĝajn foirajn bultenojn kaj dissendante ilin en la tutan mondon, tradukis publikaĵojn de Ĉs. Akademio de Sciencoj ktp.

Granda kluba entrepreno estis la 8-a kongreso de ĉs. esperantistoj (1950), kiu partoprenis pli ol 1000 homoj. Plua postmilita kongreso komisiita al la klubo estis la Konstitua Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en la jaro 1969 kun partopreno de 400 samideanoj.

La fama parto de la kluba aktiveco estas la solenaj koncertvesperoj sub artisma gvido de prof. V. Scheiber; ili okazas ekde 1946 dufoje jare okaze de la kongresoj kaj solenaj kunvenoj, partoprenas en ili eminentaj artistoj de la brna muzika vivo.

Al multflanka aktiveco de la klubo apartenas klerigaj, popularsciencaj prelegoj el ĉiuj sferoj de la homa scio; kunlaboro kun diversaj Esperanto-organizaĵoj k.a.

Konsiderinda estas la literatura agado de ties membroj: prese aperis "Pano" de J. Seifert en traduko de J. Kořínek, "Libro de Apokrifoj" de K. Čapek en traduko de J. Vondroušek. Sed en manuskriptoj ekzistas pluraj verkoj atendantaj eldoneblon: Manon Lescaut, opero Jakobeno, Bestetoj de K. V. Rais, Rakontoj el unu poŝo, Rakontoj el la dua poŝo, Saturnin, Ondro kaj drako kaj aliaj.

Al la klubo ni deziras, ke ĝi restu fidela al sia elprovita tradicio kaj atingu plenan prosperon.

Josef V o n d r o u š e k

## Mládež se opět hlásí o slovo

Je tomu již dost dávno, co se na stránkách Starta objevovaly rozsáhlé zprávy o činnosti Sekce mládeže Českého esperantského svazu. Nechceme se vymlouvat, i když odmlka nebyla zaviněna jen a jen námi. V sedmičlenném vedení sekce je pět vysokoškoláků - všichni dnes dobře víme, jak se na vysokých školách změnila situace, jak se zvýšily nároky. A tak zájmová činnost musela ustoupit neodkladným povinnostem. Objevily se i starosti rodinné, vojenská služba, a to všechno přineslo stagnaci ve vedení a tím i v celém mládežnickém hnutí.

Ale jako probudil princ Šípkovou Růženku ze spánku, tak nastalo probuzení i v mládežnickém hnutí. Tím princem v našem případě je kroužek mladých esperantistů v Mělníku. Pravda, "mládata" z Mělníku jsou sotva škoře odrostlí, budou asi hodně klopytat. Leč mají chuť a snahu znovu rozvířít hladinu mládežnického dění, a co je důležité, ovládají dobře esperanto. Proto jim držíme palce! Bude záležet i na nás starších, jak bude jejich práce pokračovat. K elánu se přidají zkušenosti, nu a pak - budeme hodnotit.

Tož tedy všichni, kdož máte zájem o práci v mládežnické sekci, spojte se s mělnickými! Svoje připomínky, návrhy a rady posílejte na adresu budoucí předsedkyně SM ČES Jindry Řehákové, Marxova 2553, Mělník, nebo jejího zástupce Václava Vítka, Čs. armády 26, Mělník.

Bývalé vedení sekce také ještě neustoupilo ze scény. Musí se se svými funkcemi rozloučit, jak se patří a předat štafetu podle pravidel. Proto se připravuje hromadné setkání esperantské mládeže ČSR. Zřejmě se sejdem až po prázdninách, ale o tom bychom vás informovali v příštích číslech Starta. Pročítejte si proto jeho stránky pozorně.

Na setkání bychom chtěli projednat otázky týkající se našeho hnutí a připravit plán činnosti. Těšíme se na vaše dopisy, které by pomohly orientovat naši činnost tak, aby mladí v hnutí pracovali rádi a aby jim esperanto bylo opravdovým pomocníkem při překonávání různých osobních překážek.

Pište tedy, čekáme na vaši odezvu, vždyť i váš hlas jistě pomůže probudit novou sekci mládeže.

D.Z.

*Prospere al "Starto",  
Saluton al ĝiaj leg-  
antoj, sukceso al  
ĝiaj garantoj.  
Majo 1971 Kore: K. Kalocsay*

SALUTO DE KOLOMANO KALOCSAY.  
La plej granda majstro de la Esperanta tradukarto, kvankam jam preskaŭ okdekjara, daŭre aktivas sur la literatura kampo. Antaŭnelonge aperis en lia traduko "La Tempesto" de W. Shakespeare. Li zorgas krome pri la lingva kaj stila korekteco de HUNGARA VIVO. K. Kalocsay petas ĉs. samideanojn partopreni en la kreado de tiu ĉi gazeto, kiu baldaŭ ŝanĝos sian nomon je - NOVA VIVO. - Dum interparolo kun la redaktoro de STARTO li aŭtoris tiujn ĉi salutajn vortojn.

**T**aké my jsme hledali a našli prostor i směr naší činnosti, abychom veřejnosti, dosud tak málo informované o našich cílech, ukázali, za co bojujeme, a kde se naše snažení kryje s cíli a usilím našeho státu. Jsme si dobře vědomi, že náš cíl - dorozumění mezi národy na základě společného jazyka - se může naplnit jen tehdy, nezůstanou-li naše myšlenky a činnost uzavřeny ve zdech klubovny.

Máme svého zástupce v Národní frontě, kde hledáme styčné plochy spolupráce s jinými organizacemi, využíváme jejich specifického působení. Právě zde vznikla naše spolupráce s Okresní mírovou radou. Naše myšlenky a akce dostávají tak oficiální charakter a přerůstají rámcem našeho městečka, naše slova jsou hlasitější a pronikají i tam, kde by jinak nebyla slyšet. Domníváme se, že úzká spolupráce esperantského hnutí s hnutím mírovým by v dnešní době vyřešila mnoho problémů na obou stranách - a nejen na úrovni klubů!

Ze zorného úhlu takovéto spolupráce se i akce, běžně prováděné každým klubem, jako korespondence, besedy o různých zemích, vzájemné návštěvy, družební styky ap. jeví jako společensky daleko závažnější a jsou i společností kladně hodnoceny.

Jsme přesvědčení, že plná an-

gažovanost právě na tomto poli, zdůrazňování mírotvorných principů esperantismu a úzká spolupráce s mírovými orgány je jednou z nejspolehlivějších cest vedoucích k rozvoji esperantského hnutí.

Jde nám o progresivní věc a ta nemůže být napořád spojována s přežitými formami práce! Není nic

tragičtějšího než to, že myšlenka či hnutí by měly být odsouzeny k dějinné bezvýznamosti jen proto, že nebylo pro ně uděláno vše, co bylo v silách jejich propagátorů.

To jsou tedy stěžejní myšlenky, na nichž budujeme naši činnost a jimž jsme podrobili i organizační strukturu klubu. Pokud naše koncepce vyprovokuje diskusi, pokud diskuse oddělí přežitě od perspektivního, s cílem pomoci rozvoji hnutí, pak tato výzva splní své poslání.

Esperantský klub Bor u Tachova

#### PEDAGOGIA SEKCIO INFORMAS

Tritaga seminario kunvokita de la Pedagogia Sekcio de ĈEA, la lastan februaron en Třebíč, multflanke vigligis fervoron de la membroj. Ĝi akcentis i.a., ke korespondaj kursoj estas moderna kaj perspektiva instrusistemo adekvata al la hodiaŭaj postuloj. Tiu rilatajn sugestojn bv. adresi al d-ro J.Hradil, Český Dub, okr.Liberec.

La nova seminario, kiu okazos verŝajne en oktobro, pritraktos i.a. subtenon al porinfana gazeto eldonota en Hungario. Pri la detaloj ekscios la membroj de PS en la 6-a n-ro de nia cirkulero.

Protokolon de la seminario en Třebíč (8-paĝan) sendos al interesitoj K. Kraft, Obořiště 107, okr. Příbram. (k)

KOPIADON DE MAGNETOFONAJ PROGRAMOJ de PS ne plu prizorgas s-rano F.Průcha.

La sekcio serĉas spertan samideanon, kiu disponas pri necesa teknika ekipa kaj pretas kopii la programojn, ke li anoncu sin ĉe s-rano K.Kraft, Obořiště 107, Příbram. (Interesato pri kopio sendas sian magnetofonan bendon kaj kotizon de 20 Kčs por unu kopio.) (van)

BALNEA EN LA JARLIBRO 1971. Laŭ iniciato de s-rano J.Lička el Karlovy Vary mi peris publikigon de tutpaĝa, en devizoj pagita anonco por BALNEA - reprezentanto de ĉs. banlokoj - en la lasta Jarlibro, 1-a parto, pg.90. Ĝi estas la unua anonco aperinta en tiu ĉi periodaĵo post sufiĉe longa tempo. Estus dezirinde, ke vi provu akiri similan anoncon en la publikaĵoj de UEA.

Ing.F.Sviták, ĉefdelegito

## LATVA SSR INSTRUIGAS ESPERANTON

La edukministerio de Latva SSR eldonis lastatempe instruprogramon de Esperanto, kiu estas oficiala por ĉiuj lernejoj, kie troviĝas instrukapablaj esperantistoj kaj interesigantoj pri la lernado.

Reage al tiu ĉi paŝo la Domo de Instruistoj organizis unuajn oficialajn E-kursojn por instruistoj kaj aliaj, kiuj havas intereson pri la Internacia Lingvo. La kursoj estas senpagaj. Sa-

lajron al la instruistoj de Esperanto pagas la respubliko.

Nun en la komenca stadio oni instruas Esperanton nur al libervoluloj, evidente pro nesufiĉa nombro de kapablaj instruistoj.

Latva SSR estas post Estona kaj Litova SSR jam la tria sovetia respubliko, kie oni instruigas internacian lingvon.

(laŭ Revuo Esperanto)

## TELEGRAFE EL LONDONO . . .

- En la 24a. sesio de Internacia Somera Universitato ĉe la 56-a UK prelegos dek fakuloj, inter ili prof. Peevski el Bulgario, prof. Isaev el Sovetunio, prof. Lapenna kaj prof. Waringhien.
- Pluraj filmoj por la kongresa filmprezento estas jam en preparo kaj oni tradukas ilin en la Internacian Lingvon.
- La unusemajna Internacia Infana Kongreseto estas plene rezervita kun 72 infanoj el Britio, Belgio, Francio, FRG, Italio, Norvegio, Hispanio, Nederlando, Bulgario, Svedio kaj Austrio.
- Laŭ aranĝo kun la aŭtomobilista klubo RAC sur pluraj strat-indikiloj en la centra Londono aperos la vortoj "Esperanto-Kongreso".

## RENKONTIĜO EN DUNAÚJVÁROŠ

En la nove konstruita moderna urbo sur Danubo, proks. 80 km sude de Budapeŝto, renkontiĝis inter 30.4. kaj 2.5. 1971 junaj esperantistoj el Hungario kaj preskaŭ dudeko da eksterlandaj gastoj el Pollando, GDR, Jugoslavio kaj ĈSSR.

La junularan sekcion de ĈEA reprezentis sekretario de ĈEA Pavel Polnický kaj A. Staník. La delegitoj de la unuopaj junularaj organizaĵoj interkonsentis plifirmigi la reciprokajn rilatojn kaj kunlaboron.

## VESPERON EN ORIGINALA HUNGARA ĈARDO

kaj diversajn aliajn aranĝojn vi povas ĝui, se vi aliĝos al la Vintra Esperantista Ferio en Budapeŝto (28.12. 1971 - 2.1.1972). Partoprenkotizo, kiu inkluzivas tranokton, manĝadon kaj enirbileton, estas nur 750 forintoj! La aliĝilon bv. sendi al : 1-a Teritoria Komitato de HEA, Budapest 70, Postaŝiok 153, Hungario. Limdato por aliĝoj : 30.9.1971 !

## ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA TRAVIVIS

la 8-an de junio en sia nova klubejo (P r a h a 1, Václavské nám. 56, pasejo Blaník) vesperon de altnivela arto dank'al sindona triopo el Ústí nad Labem. S-ano M. Smyčka, ano de tiea teatro, prezentis du poemojn el la ĵus aperintaj Sileziaj Kantoj de P. Bezruč, poste vicon da kantoj de Beethoven, A. Dvořák kaj F. Schubert. S-ano V. Novobilský enkondukis la poemojn per enhavoriĉa prelego pri Bezruč kaj poste prezentis sin kiel lerta pianisto, akompanante la kantojn. La tria ano de la triopo, s-ano J. Kořínek, ne ĉeestis, sed kontribuis al la sukceso de la vespero per majstra traduko de la prezentitaj verkoj, kiun li devis fari en la lastaj tagoj resp. noktoj. (fx)

ALMANAKON PRI HISTORIO DE LA ESPERANTO MOVADO EN ĈSSR eldonos ĈEA okaze de la 70-a datreveno de la fondo de EK en Brno. Ĝi enhavos raportojn, kiuj estis prezentitaj ĉe la konferenco pri tiu temo en Brno la 12an kaj 13an de junio 1971.

# Ĝenka do sekretariatu



V současné době probíhá velká náborová akce nových členů svazu. Náborový dopis a informační materiály jsme rozeslali na více než 1.500 různých adres, podle seznamů a kartoték z minulých let.

Samozřejmě, někdy tuto zásilku dostane i některý člen svazu. Prosíme Vás proto, abyste případná nedopatření omluvili. Obdrženou zásilku použijte k získání nového člena ve Vašem okolí. Během dubna jsme získali příspěvky od dalších 240 členů. Celkový počet platících členů svazu k 31. dubnu 1971 je pouze 1.574 !!!!

**PŘEHLED EK podle počtu členů, kteří zaplatili členský příspěvek:**  
Praha - 219, Paskov - 105, Třebíč - 88, Mělník a VŽKG - 68, Kopřivnice - 63, Brno PKO - 50, Vsetín - 41, Třinec - 38, Č. Budějovice - 34, Plzeň - 30, Ústí n/L. - 29, Ždár n/S. - 28, Jablonec - 26, Pardubice, Písek, Stonava a Tábor - 25, Bor, Č. Třebová a Poděbrady - 24, Polička 23, Kolín - 22, Bučovice a Mor. Budějovice - 21, Hr. Králové - 20, Hranice a Poruba - 19, Olomouc a Teplice - 18, Svitavy - 16, Havl. Brod a Vyškov - 14, Hořice - 13, Brno I.B. a Miletín - 12, Příbram, K. Vary a Most - 11, Lanškroun a Ostrava ČSD - 10, Frýdlant, Gottwaldov, Kladno a Místek - 9, Havířov, Městec Král. a N. Jičín - 8, Č. Lípa a Kyjov - 7, Praha ČSD, Přerov a Žamberk - 6, Boskovice, Lichnov, Ml.Boleslav Slavkov a Znojmo SZTŠ - 5.

**SPORTOVCI POZOR !!!** V rámci setkání čs. esperantistů ve Vsetíně /24.-27. září 1971/ je plánováno také vzájemné utkání v odbíjené mužů i žen a případně i v kopané mezi družstvy ČES a ZESSR. Máte-li zájem, pište ihned na adresu: ČES, poštovní schr.8, Praha 2.

## KARL-MARX-STADT INVITAS VIN

De 6.8. ĝis 15.8.71 oni okazigos la II-an tendaron de la Esperanto-junuĝaro sur la kampaĵejo Rabenstein apud Karl-Marx-Stadt. Programo de la tendaro enhavas seminarion kun lingva ekzameno, sportaj konkursoj k.a. Kotizo: 75,50 M /kategorio A/ - inkluzivas tranokton en kvarlitaj meblitaj tendoj, tagmanĝon kaj ekskursojn ; 55,50 M por kategorio B /se oni kunportas ekipaĵon kaj tendon/.

Aligilon kun indikoj pri via adreso, naskiĝdato, kategorio kaj event.partopreno al la lingva ekzameno sendu laŭeble ĝis la 30-a de junio al : Deutscher Kulturbund, BAK - Esperanto, 90 Karl-Marx-Stadt, Dr.-Otto-Nuschke-Strasse 6. Sendu samtempe garantian sumon de 25 M.

GESAMIDEANOJ VETURANTAJ TRA ĈEĤOSLOVAKIO, haltu en la bela banurbo Poděbrady, kie vi povos tranokti ĉe esperantista familio : Alois Štěpánek, Zápotockého 292/7, Poděbrady, Ĉeĥoslovakio.

NI PARDONPETAS la legantojn kaj la aŭtoron de la karikaturo en la tria numero, s-anon A. Bartošík. Sub la desegnaĵo, kiu prezentas prezidanton de ĈEA, J. Vítek, devis esti jena teksto : "Karaĵo gesamideanoj, se vi ĉiuj helpos nutri mian verdan ĉevaleton, mi provos salti pliajn dudek cm!"

LA PROPONON EKSPERIMENTE INSTRUI ESPERANTON en elektotaj lernejoj de Nordrejn-Vestfalio, aprobis la kulturministro de ĉi tiu okcidentgermana ŝtato.

# Korespondi deziras

G D R - Ing. Otto DOCKHORN, 51j.  
Finkenweg 10, 50 Erfurt (b.k., pm)  
• f-ino Kerstin SENFTLEBEN, 17j.  
Marktstr. 5, 50 Erfurt (b.k., p.m.)  
• s-ro Werner GREBHANN, 40j. Lan-  
genhaiber Str. 54, 5808, Tabarz (bk.)  
• s-ro Johannes KÖHLER, 8601, Burk

bei Bautzen (pri ĉ.t.) • s-ro Fritz ULRICH, an der Harth 45, 53  
Oberweimar (p.m.) • s-ino Erika KOPIETZ, Ferrestr. 3, 7031 Leip-  
zig (pri ĉ.t.) • s-ro Gerhard WINTER, Coppistr. 27, 7022, Leipzig  
(pri ĉ.t.) • s-ro Günter ZEHR, Pistorisstr. 33, 7031, Leipzig (pri  
ĉ.t.) • s-ro Oskar STOLBERG, Erich-Ferlstr. 78, 705, Leipzig (pri ĉ.  
t.) • s-ro Manfred GRÄNITZ, Ernst-Schneller-Str. 87, 90, Karl-Marx  
-Stadt • s-ro Paul KIRSCH, 31j. bibliotekisto, 8812, Sieffeners-  
dorf, G.Hauptmann-Str. 3 (pri ĉ.t.) • s-ino Elise DITTRICH, 87  
Löbau SA., Bautzener Str. 10 (koloraj b.k.)

POLLANDO - Zdislav JALOWIECKI, 46j. redaktoro, Olsztyn, ul. Okrzei  
26a - mll (per b.k.) • f-ino Karolina FILIPIAK, 17j. studentino,  
Nowy Sacz 1, ul. Borelowskiego 8/3 (kanzonoj, b.k., p.m.) • S. SMI-  
GIELSKI, Komorno k/Kezla, techn. roln., woj. Opole.

HUNGARIO - Ottó KOTSIS, adjunkto de agrikultura faklernejo, Ka-  
posvar pf. 16 (kun samfakuloj de bredada scienco ks.)

R S F S R - Nataša KALININA, 17j. studentino, Oktobra prospekto,  
d. 40/7, kv. 35, Velikie Luki, Pskovskaja obl.

LITOVA SSR - f-ino Viktorija PULNNIKYTE, str. Taikos prospek-  
tas 10-7, Klaipeda-2 • f-ino Beta KAUPYTE, 24j. instruistino, str.  
Silutes, pl. 8-6, Klaipeda (pri ĉ.t.) • V. JANKEVICIUS, 15j. lernan-  
to, Siltnamiu kelias 32-10, 232035, Vilnius (b.k., p.m.) • Petras  
GUOGIS, 15j. lernanto, Architekty 8-47, Vilnius • Vilnius JUODVIR-  
SIS, 15j. lernanto, Architekty 25-66, Vilnius

ESTONA SSR - Ing. Aksel KIVISTIK, 42j., Ed. Vilde tee, 59-23, Tal-  
linn-29, 200029 (b.k., p.m.) • f-ino Maia VÄIKO, 15j., Polva raj.,  
Ihanaru (pri ĉ.t.) • f-ino Merike TENS, 16j., Randtee 21, Tartu,  
202400 (b.k.)

KUBO - Oscar OTERO, instruisto, Blanquita 261, Reparto Maceo, Ha-  
vana (serĉas korespondantojn ankaŭ por siaj lernantoj).

FRANCIO - s-ro F. DEPREUX, 266, Rue de Saint-Quentin, 59 - Caudry  
(p.m.) • s-ro Claude LONGUE-ÉPÉE, 10 Route de Troyes, 51/FAGNIE-  
RÉS (kun inĝeniero, teknikisto aŭ laboristo de sukerfabriko).

JAPANIO - s-ro Ooya SHIN, 25j., Fuyoso, 2-28-17, Kitakata, Ichi-  
kawa, Chiba.

ITALIO - Parapsikologistoj esperantistoj, kiuj ŝatas kolekti ĝi  
idee, estas petataj tuj skribi al s-ano prof. Corrado CERRI-CAL-  
ZONI, Casella Postale 159-13051, Biella.

---

S T A R T O - eldonas Ĉeĥa Esperanto-Asocio - vydává Český e-  
sperantský svaz, p. schr. 8, Praha 2. Aperas dufoje kvaronjare -  
vychází dvakrát čtvrtletně. Redaktas - rediguje Oldřich Kní-  
chal kun redakta komitato - s redakční radou: ing. Eduard Fe-  
lix, Jaroslav Mařík, ing. František Sviták. Dohlédací pošta Pra-  
ha 07, snížený poštovní poplatek povolen ŘP Praha j. znač. P/1 -  
2283/1971 dne 6.5.71.